

Ipl 56 (1/2006)

Enhavo

1	Interlingvistiko en universitatoj	2
1.1	Interlingvistiko en la universitato de Amsterdam (<i>Wim Jansen</i>)	2
1.2	Disertacio de <i>PD d-ro Rudolf Fischer</i>	6
1.3	Lingvopolitika seminario ĉe Humboldt-Universitato.....	6
1.4	La Interlingvistikaj Studoj en Poznan 2005/06 (<i>Ilona Koutny</i>).....	7
1.5	<i>Aleksandro Melnikov</i> : doktoro de sciencoj kaj profesoro	7
1.6	Disertacio de <i>d-ro Kimura Goro</i>	7
1.7	Studofinaj disertacioj (<i>Soňa Horáčková, Sebastian Kirf</i>)	8
2	Interlingvistiko en Brazilo	8
3	Interlingvistiko en Italio (<i>Federico Gobbo</i>).....	10
4	Nova retejo pri planlingvoj en Svisio (<i>Andreas Künzli</i>)	12
5	Novaj interlingvistikaj publikigaĵoj.....	12
5.1	“Interlinguistica Tartuensis” Volumo VIII.....	12
5.2	Aktoj de la 14-a Konferenco de GIL.....	14
5.3	Simpozio pri interkultura komunikado en Gotenburgo.....	15
5.4	Esperantologio – Esperanto Studies (EES) kajero 3	16
5.5	Libro de <i>Marc van Oostendorp</i> pri Esperanto.....	17
5.6	Interlingvistikaj temoj en tradukscienca antologio.....	17
5.7	KAEST-volumo 4.....	18
6	KAEST: Konferencoj Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko..	18
	(<i>Petr Chrdle</i>)	
7	Bibliotekoj kaj arkivoj	21
7.1	Esperanto-Biblioteko en Milano (<i>Andrea Montagne</i>).....	21
7.2	Katalogo II de la <i>Fajszki-Kolekto</i>	22
7.3	Kolekto de familio <i>Blanke</i> eniros ŝtatan arkivon.....	23
8	Finna libro: Pri eŭropa lingvo-politiko (<i>Jouko Lindstedt</i>)	23

1 Interlingvistiko en universitatoj

1.1 Interlingvistiko en la universitato de Amsterdam

Kiel konate, ekde kelkaj jaroj en la Universitato de Amsterdam ekzistas katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto. Por nur mallongdaŭra periodo ĝin gvidis la nederlanda lingvisto *d-ro Marc van Oostendorp*. Post li la katedron transprenis alia nederlandano, *Wim Jansen*, kiu ne nur estas inĝeniero sed ankaŭ magistro pri filologio. Li i.a. estas rekonata specialisto pri la eŭska lingvo. Jen sekvas priskribo de la katedro kaj laboro laŭ materialo de Wim Jansen. (*La red.*)

1.1.1 La katedro

De 1998 ekzistas ĉe la Universitato de Amsterdamo eksterordinara *katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto*. Laŭ la difino de la universitato, la gvidanto de la katedro respondecas pri la kontinuigo kaj plilarĝigo de la instruado kaj esplorado sur la kampo de la interlingvistiko, kun aparta atento al la teorio kaj praktika uzo de planlingvoj, inter kiuj Esperanto okupas centran rolon. La katedrulo devas disponigi averaĝon de 1,5 tagoj ĉiusemajne por la plenumo de siaj universitataj taskoj.

Eksterordinara katedrulo havas la saman statuson kiel samranga ordinara docento aŭ profesoro, konformas al la samaj dungokondiĉoj kiel tiuj ĉi lastaj, kaj liaj instru- kaj esplorprogramo devas respondi al la samaj kvalito-postuloj de la universitato.

Studentoj, kiuj sukcese ekzameniĝas en la fakoj instruataj de eksterordinarulo, ricevas la samajn kreditpoentojn kiel ĉe ordinarulo kun samampleksa fako. La sola diferenco inter la du kategorioj estas, ke ordinarulo ricevas universitatan salajron, kontraŭ eksterordinarulo, kutime reprezentanta iom pli “ekzotikan” fakon, kiu ricevas honorarion de sia sponsora organizo. La katedro ĉe la Universitato de Amsterdamo daŭrigas duonjarcentan tradicion de instruado pri kaj de Esperanto fare de docentoj kaj privataj docentoj, inter kiuj elstaras la nomoj de *Pragano*, *Middelkoop* kaj *Moerbeek*.

De la 1a de februaro 2002 okupas ĝin la *docento Wim Jansen*, inĝeniero, magistro pri kompara lingvistiko kaj longjara esperantisto. Okaze de la kunfandiĝo de la nederlanda fondaĵo “Esperanto bij het Onderwijs” kun Internacia Esperanto-Instituto (IEI), en julio 2004, tiu ĉi lasta transprenis la respondecon kiel sponsora organizaĵo de la katedro. En novembro 2002 la universitato formale agnoskis la pozicion de IEI. La docento plenumas sian taskon sub kontrakto kun IEI kaj liveras al ties estraro jarraporton pri siaj agadoj.

Plenumiĝis ĝis nun kvar instrucikloj de la lekciaro pri interlingvistiko, ĉiuj okazintaj inter septembro kaj decembro kaj finitaj per skriba ekzameno en januaro: de 2002-2003 al 2005-2006. La instrufako interlingvistiko estas libere

elektebla fako sen partoprenkondiĉoj, sed ĝi konformas pli malpli al la nivelo de triajara studento kun baza scio pri ĝenerala aŭ kompara lingvistiko.

1.1.2 Kie kaj kiam?

Dum la jaro, la docento estas atingebla ĉiumarde ĉe la sekvanta adreso de la katedrejo:

Bunghuis, oficejo 352

Spuistraat 210

1012 VT Amsterdam

Tel. +31-20-525 4683

Retpoŝtadreso: w.h.jansen@uva.nl

La lekcionoj ofte okazas en lekcio ĉe la sama adreso, aŭ en apuda lekcio de la fakultato. Ankaŭ la biblioteko pri ĝenerala lingvistiko kaj pri kelkaj lingvoj (i.a. la angla, germana kaj itala) troviĝas ĉe la sama adreso.

1.1.3 Esplorado

Dum la unua kaj parte dua instruciklo, granda parto de la tempo disponebla por esplorado estis dediĉita al la kompilado de baza kurslibro pri la fako interlingvistiko, kiu ĝis tiam mankis. Ĝi rezultigis la libron *Elementen uit de interlinguïstiek* (Elementoj el la interlingvistiko)¹, pri kies detaloj vidu la sekvantan paragrafon. Ekde de la komenco de 2004 aldoniĝis pli fundamenta esplortemo pri la vortordo en Esperanto, pri kiu la docento estas preparanta doktorigan disertacion.

1.1.4 Instruado

La nombro da studentoj estis 2 en la akademia jaro 2002-2003, 5 en 2003-2004, 4 en 2004-2005 kaj 6 en 2005-2006. La studentoj estas plej ofte ĉirkaŭ la tria jaro de sia kariero, do proksimaj al sia bakalaŭra diplomiĝo. Okazas ankaŭ, ke studentoj proksimaj al sia magistriĝo, kaj finintaj ĉiujn siajn devigajn fakojn, elektas interlingvistikon inter siaj libere elekteblaj aldonaĵoj. La studentoj venas ĝenerale el iu lingvistika direkto, ĉu ĝenerala lingvistiko, ĉu iu specifa lingvaro kiel slavistiko, aŭ — relative ofte — el la fako anglistiko. La kurson 2005-2006 partoprenis por la unua fojo eksterlandaj ‘Erasmus’ stipendiuloj, nome du studentinoj pri tradukado kaj interpretado el Antverpeno.

La deviga kurslibro *Elementen uit de interlinguïstiek* (Elementoj el la interlingvistiko) estas verkaĵo de la docento mem. Ĝi estas 300-paĝa superrigardo de la tereno, kiun studas la interlingvistiko, kaj kiu estas dividita en 14 ĉapitrojn laŭ la sekvanta temaro: lingva diverseco, lingva superrego kaj internacia komunikado; enkonduko en la interlingvistikon; fragmentoj el la historio de la planlingvoj; historio kaj tipologio de tri modernaj planlingvoj;

¹ Vidu la reproduktaĵon de la enhavtabelo en IpI 52 (1/2005): 12-15.

strukturaj elektelecoj ene de planlingvoj; historio de la Esperanto-movado; planlingvaj aspektoj en ‘natura’ lingvo: la eŭska; rezistoj kontraŭ planlingvoj; Esperanto kiel literatura lingvo; la ĝisdatigeblo de la Esperanto-vorttrezoro; ebla scenaro por la estonteco de Esperanto; bibliografio. Paralela al la kurslibro estas deviga literaturlisto, kiu konsistas ekz. el verkoj de *Phillipson* kaj *Crystal*, el kiuj selektitaj ĉapitroj estas studendaj kaj kiuj estas ekzamenataj semestromeze.

La instruperiodo estas la unua semestro de ĉiu akademia jaro, t.e. inter la komenco de septembro kaj fino de decembro. Dum tiu ĉi periodo estas tenataj 14 sesioj de po tri horoj, dum kiuj la docento prelegas surbaze de sia kurslibro. Unu el la sesioj estas gvidata de *Atilio Orellana Rojas* de IEI, kiu donas Cseh-lecionon de Esperanto. La skriba finekzameno okazas ĉiujare en januaro. Sukcesa ekzameniĝo donas al la studento 10 kreditajn poentojn laŭ la tuteŭropa ECTS-poentaro.

1.1.5 Staĝoj al Universalaj Kongresoj

La Universitato de Amsterdamo agnoskis la Universalajn Kongresojn de Esperanto kiel validan staĝejon, kie studento rajtas plenumi antaŭe aprobitan esplorkonferon kaj gajni 5 poentojn sekve al la pozitiva juĝo de la submetenda esplorraporto. Ĉiujare la staĝo estas diskonigata tra la universitata reto en la formo de stipendio, kiun studento povas gajni per venko en esplorkonkurso. La stipendio estas financata el subvencioj kaj donacoj de institutoj kaj privatuloj. Du studentoj, ekzamenitoj en interlingvistiko, vizitis la 89an UK en Pekino kaj plenumis tie surlokan esploron pri kelkaj intonaciaj fenomenoj en Esperanto.

1.1.6 Publikaj simpozioj

Grava faceto de la katedra laboro estas la organizado de simpozioj pri iu aktuala temo, en kiu planlingvoj ludas aŭ povus ludi ŝlosilan rolon. La simpozioj estas intence ne limigitaj al fakuloj, sed publikaj, por maksimumigi la disradiadon al la ĝenerala publiko de serioza akademia agado pri Esperanto. La 17-an de decembro 2002 okazis simpozio pri *La Lingva Estonteco de Eŭropo* (aktoj haveblaj)², kaj la 16-an de decembro 2003 tiu pri *La Natureco de Lingvo* (aktoj bedaŭrinde ne aperontaj pro nelivero de tekstoj).

1.1.7 Diversaĵoj

Inter la diversaj agadoj ligitaj al la katedro estu menciata la organizado, sub la aŭspicioj de la asocio de studentoj pri lingvistiko, de atelieroj (‘workshops’) pri Esperanto. La unua tia ateliero estis organizita la 28-an de aprilo 2004, kunlabore kun Atilio Orellana Rojas. Ĝin sekvis dek du studentoj de diversaj fakoj. Pliaj atelieroj estis organizitaj por la Teknika Universitato de Delft (oktobro 2005) kaj por la Lingvotago de la eŭropa studenta asocio Aegee en Amsterdamo (novembro 2005).

² Vidu Ipl 48-49 (1-2/2004): 5-6.

Menciinda estas ankaŭ la *mentorado de studentoj*, kiuj elektas iun interlingvistikan aŭ esperantologian temon por sia magistra aŭ alia distertacio. En la komenco de 2005 magistriĝos studentino de la Universitato de Utrecht pri la lingvaj problemoj en Eŭropa Unio. La docento de la Amsterdama katedro estis petita funkcii kiel ŝia mentoro rilate ĉiujn demandojn pri Esperanto.

En la dua semestro de 2005-2006 la docento mentoras bakalaŭran disertacion pri Esperanto, kiun preparas studento de la Universitato de Amsterdamo mem (ne sekvinto de la kurso pri interlingvistiko).

La biblioteko de la Universitato de Amsterdamo posedas kolekton de libroj kaj gazetoj en kaj pri Esperanto, kiu nombras pli ol 3000 titolojn. Parton de tiu stoko konsistigas la libraro de la landa asocio 'Esperanto Nederland', kiun la universitato mastrumas por ĝi. Post longa laboro, la tuta kolekto estas nun katalogita, kaj rete konsultebla. La adreso de la libere alirebla katalogo estas: <http://opc.uva.nl>. De la bonveniga paĝo vi povas elekti inter nederlandlingva kaj anglalingva daŭrigoj. Alklaku la supran ligan 'Catalogus van de Universiteit van Amsterdam' au 'Catalogue of the Universiteit van Amsterdam' por atingi la elirpaĝon por viaj katalogaj esploroj. En la serĉlinio 'zoeken' au 'search' tajpu la du mallongigojn 'tac esp' (sen citiloj, sed kun unu interspaco) kaj konfirmu (tac esp signifas 'taalcode Esperanto', t.e. 'lingvokodo Esperanto'). Responde vi devus ricevi la komunikon pri 3104 trafoj, kiu estas la E-kolekto, ekrane trairebla en sia tuta amplekso. Anstataŭ tajpi 'tac esp' vi povas uzi la indikitajn serĉkriteriojn, kaj tuj serĉi laŭ titolo, aŭtoro, ktp. De ĉiu trovita titolo vi trovos la aŭtoro(j)n, eldoniston, eldonjaron, bindmanieron, eventualan serian apartenan, referencnumeron, fizikan situon de la volumo kaj informojn pri la prunteblo kaj disponeblo.

1.1.8 Publicaĵoj

Kiel en la kazo de la simpozioj, la provizore ĉefa celo de la publicaĵoj estas atingi la ĝeneralan publikon kaj informi ĝin pri la ekzisto de la katedro kaj pri la fakto ke interlingvistiko, iom da esperantologio kaj iom da Esperanto estas oficiale instruataj sur universitata nivelo kaj tiel daŭrigas la Amsterdaman tradicion de duona jarcento.

Artikoloj aperis en la fakultata magazino *Babel* en majo 2004, en la revuo de la nederlanda asocio de interpretistoj kaj tradukistoj *Linguaan*, en novembro 2004 kaj en aŭgusto 2005, kaj en la jarfina numero de la revuo de la Asocio por la Nederlandaj Lingvo kaj Kulturo *Neerlandia*. Plie aperis kolumnoj en *Neerlandia*, en *NRC Handelsblad* kaj en *La Stampa*.

Por mendi kopion de publicaĵo, skribu al wimjansen@casema.nl.

(Laŭ materialo de *Doc. Wim Jansen*)

1.2 Disertacio de PD d-ro Rudolf Fischer

La konata germana esperantisto Rudolf Fischer estas habilitiĝinta privata docento, d-ro rer.medic., kaj laboras en la Instituto por Medicina Informadiko de la Universitato Münster/Germanio. Je sia 60-a naskiĝtago li faris al si tre originalan donacon: Li denove doktoriĝis, sed ĉifoje pri lingvistiko.

La universitato de Münster akceptis lian disertacion pri la genro en la germana lingvo. La disertacio aperis:

Fischer, Rudolf-Josef (2005): Genuszuordnung. Theorie und Praxis am Beispiel des Deutschen. (Europäische Hochschulschriften: Reihe 21, Linguistik Bd. 281). Frankfurt/M., Berlin, Bern u.a.: Peter Lang, 386 p., 2 Abb., 24 Tab., 1 Graf., ISBN 3-631-53604-6 br., 56,50 €

La 15-a jarĉefkunveno de Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL), fine de oktobro 2005 en Berlin, lin elektis membro de la estraro de GIL.

Do, gratulon al PD d-ro rer.medic., d-ro fil. Rudolf Fischer.

1.3 Lingvo-politika seminario ĉe Humboldt-Universitato Berlin

Dum la vintra semestro 2004/2005 ĉe la Ekonomika Fakultato de Humboldt-Universitato en Berlin okazis seminario kun la kadra temo „Ekonomio kaj lingvo“. Ĝin gvidis la profesoroj *Jürgen van Buer* kaj *Bengt-Arne Wickström*, krome *Anett Kralisch*.

La unuopaj seminarioj, en kiuj oni ankaŭ traktis demandojn de interlingvistika signifo, havis jenajn temojn:

- ekonomio kaj lingvo: enkonduko
- komunikado, lingvo, identeco
- lingvo kiel realaĵo ekster retoj
- lingvo kaj identeco
- lingvo-ŝanĝo kaj disvastiĝo
- planado kaj normigado: motivoj, sociala, politika kaj ekonomia potencoj
- lingvo kaj labormerkato
- efikeco kaj dulingveco en ekvilibro
- ekonomiaj kaj ekologiaj faktoroj kaj la diverseco de lingvoj
- tutmondiĝo kaj lingvo
- mortado de lingvoj
- lingvoj en la interreto
- ekonomio en la lingvo: redukto de redundo kontraŭ klareco en la komunikado
- pidĝinaj lingvoj, kreolaj lingvoj, planlingvoj kaj efikeco en la komunikado

Informoj ĉe prof. Bengt-Arne Wickström: wickstr@wiwi.hu-berlin.de

1.4 La Interlingvistikaj Studoj en Poznano 2005/06

Inter la 26-30a de septembro okazis la unua sesio por la novaj gestudentoj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), en Poznan. 27 kandidatoj el 13 landoj aliĝis al la trijara ekstera studado, kiu postulas surlokan partoprenon nur dum unu intensa semajno ĉiusemestre, kaj tion sekvas hejma laboro kaj reta konsultado. La multnacia partoprenantaro ebligis interesajn interkulturajn komparojn.

La unua semestro konsistis el la kursoj pri komunikado (*Ilona Koutny*), enkonduko en esperantan kulturon (*Zbigniew Galor*), esperanta literaturo de la unua periodo (*Lidia Ligeza* kaj *Tomasz Chmielik*) kaj interlingvistiko 1 (*Vera Barandovská-Frank* kaj *Detlev Blanke*). La kurson pri kulturo kompletigis la prelegoj pri e-a teatro (*Zofia Banet-Fornalowa*), pri e-a muziko (*Floréal Martorell*) kaj pri e-aj filmoj (*Roman Dobrzyński*) okazintaj jam enkadre de la semajnfina kultura renkontiĝo Arkones.

Dum la sama semajno tri finstudintoj faris sukcesan finekzamenon defendante sian diplomlaboraĵon pri metodiko gvidatan de *Katalin Kovats: Alain Delmotte* (Belgio): Analizo de vortprovizo en kvar lernolibroj; *Iwona Kocięba* (polino el Belgio): Instruado de akuzativo; *Mónika Molnár* (hungarino el Svislando): Muziko en la instruado.

d-rino Ilona Koutny, akademiano
gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj
Universitato Adam Mickiewicz
Miedzochodzka 5, PL-60-371 Poznan
T: +48 61 829-27-09,
Sekretariejo: 829-27-01; F: +48 61 829-27-00
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

1.5 Aleksandro Melnikov: doktoro de sciencoj kaj profesoro

Ekde la 15-a de julio 2005 la konata esperantisto kaj interlingvisto, *d-ro Aleksandro Melnikov*, estas “doktoro de sciencoj”, la plej alta akademia grado en Rusio, kiu korespondas al la germana “habilitiĝinta doktoro” (Dr. habil. aŭ Dr. sc.). Ekde la unua de septembro 2005 Melnikov fariĝis profesoro ĉe la Ŝtata Pedagogia Universitato en Rostov/ĉe Don /Ruslando). Pri lia disertacio ni raportis en IPI 53(2/2005):5-7. Gratulon al la nova profesoro.

1.6 Disertacio de d-ro Kimura Goro

La konata japana esperantisto kaj lingvisto, D-ro KIMURA Goro, elektis por Japanio nekutiman temon por sia doktoriga disertacio. Li verkis pri du minoritajn lingvojn: la soraba kaj la kornvala lingvoj. La disertacio ĵus aperis:
KIMURA, Goro (2005): Gengo ni totte "Zin'isei" towa nanika - Gengokootiku

to gengoideorogii: Kerunoogo, Sorubugo wo ziree tosite. Tokyo: Sangensha, 608 p. (Kian rolon ludas la intenco ĉe lingvaj ago? Lingvo-konstruado kaj lingvajn ideologioj, traktitaj ĉe la ekzemplo de la soraba kaj kornvala lingvoj.)

1.7 Studofinaj disertacioj

Soňa Horáčková (2005): Esperanto jako jeden z modelů komunikace v současném světě. (Esperanto kiel unu el la komunikaj modeloj en la nuntempa mondo.) Plzeň (Pilzeno) (CZ): Okcidentbohemia Universitato, Filozofia Fakultato, studfako Teorio kaj filozofio de komunikado. 81 paĝoj.

(Esperanto kiel unu el la komunikiloj de la nuntempa mondo. Magistra disertacio. La studentan aŭtorinon gvidis PhDr. Zbyněk Holub, PhD. el la Pedagogia Fakultato de la Universitato. La disertacia studaĵo estis sukcese defendita la 8-an de junio 2005.

El la enhavo: Esperanto kiel viva lingvo – Komparo de Esperanto kun pli novaj projektoj de internacia lingvo – Historio de Esperanto – Esperanta kulturo – Esperanto kiel lingva tipo – Planlingvo Esperanto – Metafizika funkcio de Esperanto).

(Laŭ informoj de Jan Werner)

Kirf, Sebastian (2005): Esperanto – Ein Beitrag zur Umsetzung der Agenda 21? Emden, Fachhochschule Oldenburg/Ostfriesland/Wilhelmshaven (Emden), 127 p.

(Esperanto – Kontribuo al la realigo de Agendo 21? La diplomito pri sociala pedagogio diskutas la agendon 21, dokumento, kiu estis akceptita en Rio 1992, kaj tie la eblojn, kiujn Esperanto povus doni al la celita daŭro-efika evoluado de la homaro).

Sebastian Kirf ricevis instrukomision pri Esperanto ĉe la Altlernejo en Emden.

2 Interlingvistiko en Brazilo

Profesoroj de la Universitato de Fortaleza ekeldonadas retan *interlingvistikan revuon*.

Dum novembro 2005 aperis la unua eldono.

La redakcio skribas pri ĝi:

(Lingve iom polurita de la redaktoro de IpI)

Tiu ĉi estas la unua numero de nia *Interlingvistika Revuo*. Sed, kial eldoni tian periodaĵon ĉe nia Universitato?

Interlingvistiko ne estas nova temo inter la sciencoj, kiuj celas la esploron pri la lingvo. Fakte, la greka filozofio, antaŭ jarcentoj, pripensis la lingvon kiel studobjekton. Apartan intereson tiaj praavoj de nuntempa lingvistika scienco havis pri la tradukado de gravaj tekstoj por la ĉiama kulturo.

Sed la rilatoj inter lingvoj ne estas nur diakrona afero. Tra la homara historio la rakonto pri la Turo de Babel bedaŭrinde daŭras. La landlimoj estas ankaŭ lingvaj limoj. La milito ne estas nur problemo por militistoj, sed ankaŭ lingva batalo, ĉar la historio ĝis nun rakontas la version de la venkinto, kompreneble rakontita en sia lingvo.

La uzo de la lingvo por altrudi la politikan povon de unu lando super alia estas unu el la plej gravaj nuntempaj problemoj. Kaj la universitato ne povas deflankiĝi de tia diskutado. Farante tion, ĝi neus kernajn valorojn, kiel la homaj rajtoj.

Bazita sur la devo kunligi lingvajn rajtojn kun homaj rajtoj, la Interlingvistika Revuo ebligas novan kanalon por la diskutado de la rilatoj inter la diversaj homaj kodoj, ĉu ene, ĉu inter la diversaj idiomaj.

Nia Interlingvistika Revuo eble ne obeu al la plej tradiciaj modeloj de la akademias eldonaĵoj. En ĝia enhavo, ekzemple, la temoj estas apartigitaj en tri kategoriojn: artikoloj, prelegoj kaj tradukaĵoj, kvankam, ĝenerale, la akademias revuoj koncentras sian enhavon al la sciencaj artikoloj.

La gelegantoj trovos kelkajn el la plej interesaj tekstoj de la aktualeco. Ekzemple, estas psikolingvistika teksto, tre ĝentile sendita de Doktoro Renato Corsetti, Prezidanto de Universala Esperanto Asocio kaj Profesoro ĉe Universitato de Romo, artikolo kiu baptas tiun ĉi eldonaĵon. Estas ankaŭ tekstoj pri literaturo, tradukado, kina recenzo, al kies aŭtoroj ni varme gratulas.

Ke la Interlingvistika Revuo daŭru, ĉiam fidela al akademia celo por la lingvaj rajtoj.

Jen la enhavo de la unua numero:

Artikoloj

Renato Corsetti – Esploro pri la meznombra longo de la parol-unuo ĉe denaskaj plurlingvuloj

Paulo Nascentes – Esperanto kiel ĉies dua lingvo: ĉu paradigma ŝanĝo, ĉu nova interkompreniĝa monda sistemo?

Aloísio Sartorato – Guimarães Rosa: Ĉu Esperantisto?

Prelegoj

Eduardo Lúcio Guilherme Amaral – Recenzo pri la filmo *Lingvo, vivoj en portugala*, de Vítor Lopes

Paulo S. Viana – Konsideroj pri Traduko de *Dom Casmurro*

Tradukaĵo

Luciano Maia – *Hajko*

Manoel Ricardo de Lima – *Poemoj*

Batista de Lima – *Vertiĝo* (rakonto)

La reta adreso de la revuo:

http://leitejr.sites.uol.com.br/unifor/200511_ilr_eo.htm .

La redaktoro: prof. José Leite de Oliveira Junior: leitejr@unifor.br

3 Interlingvistiko en Italio

Federico Gobbo

Interlingvistiko kaj Esperantologio, konsideritaj kiel subfakoj, malbone konatas en la akademias kaj ĝeneralpublikaj kontekstoj de la itala socio.

Ĝeneralpublike, atento al interlingvistiko (re)naskiĝis post la publikigo de la famega libro de Eco (1993), poste tradukita en multajn lingvojn, eĉ en esperanton.

Akademie, en la itala, la vorto "interlinguistica" volas signifi la studaron de la fenomenoj komunaj al pluraj lingvoj, ofte pro kontakto (ekzemple, v. Ricca 1993).

Kelkfoje, per "interlinguistica" oni intencas 'interretnan/internacian komunikadon'. Ekzemple, en Triesto ekzistas diplomo pri 'aplika interlingvistika komunikado', kiu valoras kaj en Italio kaj en Germanio (SIT 2005).

Neniel oni konsideras planlingvojn kiel kompreniloj sub la titolo "interlinguistica", krom en la Universitato de Torino, kie ekzistas, ekde 1994, kiel konate, la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperantologio kun *docento prof. F. A. Pennacchietti*. Tiukadre oni konsideras ĝuste interlingvistikon kiel la sciencon pri planlingvoj, ne nur pri internacia komunikado.

Ontjare okazos seminario en la Insubra Universitato de Varese, kadre de la katedro de Ĝenerala Lingvistiko (*docento Giulio Facchetti*), probable unu semajnon longa, titole "Le lingue artificiali. Introduzione all' Interlinguistica e all'Esperantologia", gvidate de *Federico Gobbo*.

La nura centro ekster Universitatoj en Italio, kiu okupiĝas pri interlingvistiko estas la *Itala Interlingvistika Centro*, kiu en 2004 prezentis en Universitato IULM la reeldonon de la disertaĵo de *Perla Martinelli* "Edmond Privat: la vita e l'opera". Ĝis nun neniuj signoj eĉ IULM pri instruado de interlingvistiko eĉ tiu Universitato, kvankam la inaŭguro de la "Fondo Speciale di Esperanto/Interlinguistica", speciala ero de la loka biblioteko, okazis la 23-an de Januaro en 2002 (IULM 2005). Prizorgas la kolekton eĉefe *Andrea Montagner* (vidu en ĉi-tiu kajero, p. 21-22).

Alia grava kolekto troviĝas en Massa, bedaŭrinde ne krozebla perrete (BNE 2005).

Tamen, ekzistas sufiĉe granda kvanto da disertaĵoj rilate al esperanto, lingvaj rajtoj kaj do, flanke tuŝite, esperantologio, kadre de aliaj instruadoj kaj variaj fakultatoj.

Nenikaze troveblas sciencesplorado pli longa ol universitata tezo. Limigante nin al la lastaj kvin akademias jaroj, ni povas trovi facile almenaŭ sep laboraĵojn, la lasta estis diskutita la 3-an de novembro ĉi-jare (Fabbi, 2005).

Citaĵoj

BNE (2005). Biblioteca Nazionale Esperanto. Rete Civica Comune di Massa. URL:

http://domino.comune.massa.ms.it/sitoweb%5Csitoweb.nsf/pages/home_esperanto

Cabrini, Fabio (2001). Universal Network Language: dal mito della Lingua Universale al "traduttore" globale. Tesi di laurea. Relatore: Irina Prodanof. Universita' degli Studi. Pisa

Costantini, Mariella (2004). Esperantofonia precoce: uno studio sulla lunghezza media dell'enunciato. Tesi di laurea. Relatore: Renato Corsetti. Universita' degli Studi "La Sapienza". Roma.

Dall'Olio, Anna Maria (2004). Osservazioni sulla storia e sulla struttura dell'esperanto con particolare riferimento alla lingua italiana. Tesi di laurea. Relatore: Mirko Tavoni. Universita' degli Studi. Pisa.

De Agostini, Filippo (2000). Diritti linguistici in Europa. Tesi di laurea. Relatore: prof. Gaetano Castorina. Universita' degli Studi "La Sapienza". Roma.

Eco, Umberto (1993). La ricerca della lingua perfetta. Bari: Laterza.

Fabbi, Caterina (2005). Il ruolo dell'esperanto nella nuova Europa. Tesi di laurea. Relatore: Davide Astori. Universita' degli Studi. Parma.

Gazzola, Michele (2002). La relazione tra costi economici e costi linguistici del multilinguismo nell'Unione Europea. Tesi di laurea. Relatore: Carlo Secchi. Universita' commerciale "Luigi Bocconi". Milano.

IULM (2005). Biblioteca di Esperanto. Catalogo Aleph. URL: <http://aleph5.iulm.it/ALEPH/-/start/esperanto> (kontrolite 4.11.2005).

Parisi, Francesca (2002). Multilinguismo nel trattamento automatico del linguaggio naturale: UNL tra interlingua e linguaggio per computer. Tesi di laurea. Relatore: Mario Negri. Libera Universita' di Lingue e Comunicazione (IULM). Milano.

Ricca, Davide (1993). I verbi deittici di movimento in Europa: una ricerca interlinguistica. Firenze, La Nuova Italia, 1993.

SIT (2005). Studi italo-tedeschi. Comunicazione interlinguistica applicata – Deutsch-Italienische Studien. URL: <http://www.sslmit.univ.trieste.it/Rega/SIT.htm>. Kontrolite je 2005/11/04.

DICOM -- Dipartimento di Informatica e Comunicazione Universita' degli Studi dell'Insubria v. Mazzini 5, IT-21100 Varese Italia
tel. ++39/0332/218927 fax ++39/0332/218919
purl: <http://purl.org/net/fgobbo>
mail: federico.gobbo@uninsubria.it
skype: federicogobbo

4 Nova retejo pri planlingvoj en Svisio

La konata svisa interlingvisto *Andreas Künzli* fondis retejon pri interlingvistiko, tio signifas ĉe Künzli ne nur pri planlingvoj sed ankaŭ pri lingvo-politiko: <http://www.plansprachen.ch/>.

La retejo estas dulingva (germana kaj en Esperanto) kaj portas la subtitolon “Informoj pri la evoluo de internaciaj planlingvoj kaj la progresoj de la internacia lingva komunikado”.

La enhavtabelo:

- ▣ Aktuale/Starto
- ▣ Eventoj
- ▣ Gazetaro
- ▣ Publikigoj
- ▣ Prelegoj
- ▣ Planlingvoj
- ▣ Lingvopolitiko
- ▣ Organizoj
- ▣ Personoj
- ▣ CDELI

5 Novaj interlingvistikaj publikigaĵoj

5.1 Interlinguistica Tartuensis

Aperis la VIII-a volumo de la jam fama serio „Interlinguistica Tartuensis“, kiun redaktas prof. Aleksandr Duliĉenko:

Duliĉenko, Aleksandr D. (2006, Eld.): Interlinguistica Tartuensis VIII: Sbornik materialov meždunarodnoj konferencii. Tartu 04.03.2005. Tartu: Tartu Ülikool Tartuskij universitet, 217 p.

Jen la enhavtabelo:

Romanĉik, R. Ē.: Meždunarodnaja konferencija „Interlinguistica et eurolinguistica“ (Internacia konferenco „Interlinguistica et eurolinguistica“).

P. Aristè i interlingvistika
(P. Aristè kaj interlingvistiko)

Aristè, P. : Poluĉit li ĉeloveĉestvo obŝĉij jazyk?
(Ĉu la homaro ricevos komunan lingvon?).

Duliĉenko, A. D. : „...Ja ljublju vse jazyki...“ (Vospominanija ob akademike Paule Aristè) („...Mi amas ĉiujn lingvojn...“ [Memoroj pri akademiano Paul Aristè]).

Interlingvistika i evrolingvistika
(Interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko)

Kuznecov, S. N. : Geolingvistika, evrolingvistika, interlingvistika: problema sootnoŝenij (Tezucy) (Geolingvistiko, eŭrolingvistiko, interlingvistiko: la problemo de iliaj interrilatoj, Tezoj).

Liu, Haitao: Kio estas eŭrolingvistiko?

Frank, H. G.: La Sibiua programo de eŭrolingvistiko.

Pietiläinen, J. : Lingvoscioj en Eŭropa Unio.

Barandovská-Frank, V.: Kion la eŭropanoj sciu pri eŭropaj lingvoj?
(Diskutkontribuaĵo).

Künzli, A. : Ist Englisch gut oder schlecht für die Schweiz? Bemerkungen zum kontroversen Diskurs über das Englische als „fünfte Landessprache“ qua lingua franca in der viersprachigen Schweiz (Ĉu la angla estas bona aŭ malbona por Svisio? Rimarkoj pri la malsamopinia diskuto pri la angla kiel „kvina ŝtatlingvo“ kvazaŭ lingua franca en la kvarlingva Svisio).

Interlingvistika i esperantologija
(Interlingvistiko kaj esperantologio)

Ernits, E.: Planlingvaj libroj kaj Estonio.

Duliĉenko, A. D. : Ob idee universal'nogo jazyka Jakoba Linzbacha (predvaritel'nye zameĉanija) (Pri la ideo de universala lingvo de Jacob Linzbach, enkondukaj rimarkoj).

Gudaviĉjus, A. : Etnolingvistiĉeskie aspekty èsperanto
(Etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto).

Mel'nikov, A.: O vozmožnostjach jazykovej charakteristiki literaturnogo personaža sredstvami èsperanto (Pri la eblecoj de lingva karakterizo de literaturaj figuroj helpe de Esperanto).

Corsetti, R.: Esploro pri la meznombra longo de la parolunuo ĉe denaskaj plurlingvuloj.

Bibliografija
(Bibliografio)

Bibliografia mirovoj interlingvistiki (XIX-80-e gg. XX vv.) Sost. A.D. Duliĉenko (Bibliografio de internacia interlingvistiko (XIX-a ĝis 80-aj jaroj de XX-a jarcento, kunmetis *A. D. Duliĉenko*).

Dokumenty
(Dokumentoj)

Ustav Meždunarodnoj asociacii interlingvistiki (MAI)
(Statuto de la Internacia Asocio de Interlingvistoj).

Honorpremio „Academicus Paul Ariste“.

5.2 Aktoj de la 14-a Konferenco de GIL

La germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL) ĉiujare aranĝas fakan konferencon kaj poste aperigas la aktojn. Ili ĉiuj ankoraŭ estas haveblaj. (vidu: www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html).

La aktoj de la 14-a konferenco aperis. Temas pri la 12-a volumo de la aktaro:

Blanke, Detlev (2005, Red.): Internationale Plansprachen – Entwicklung und Vergleich“. Beiträge der 14. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 5.-7. November 2004 in Berlin. Berlin: GIL, ISSN 1432-3567, 120 S., Prezo 12 EUR + afranko.

Enhavo:

Detlev Blanke: Vorbemerkung (Antaŭrimarkoj)

Sabine Fiedler: „English as a Lingua Franca“ (Zum Modell eines nichtmutter-sprachlichen Englisch im Vergleich zum Esperanto) (La angla kiel lingua franca. Pri la modelo de negepatra angla kompare al Esperanto).

Otto Back: Babylonische Türme. Plansprachen in ihren Beziehungen untereinander und im Verhältnis zu ethnischen Sprachen (Babilonaj turoj: Planlingvoj en siaj interrilatoj kaj en rilatoj al etnaj lingvoj).

Werner Bormann: Das soziale Phänomen (La socia fenomeno).

Cornelia Mannewitz: Volapük und die Folgen (unter besonderer Berücksichtigung der Entwicklung in Russland) (Volapuko kaj la sekvoj, kun aparta konsidero de la evoluo en Rusio).

Rudolf-Josef Fischer: Die Plansprachen Esperanto und Novial im Vergleich
Lehrprobe und Meisterstück? (La planlingvo Esperanto kaj Novial en komparo.
Klopodo de lernanto kaj pruvlaboraĵo de majstro?).

Oxana Bourkina: Soziolinguistische Parameter der modernen Normaussprache
des Esperanto (Socilingvistikaj parametroj de la moderna normprononco de
Esperanto)

Cornelia Mannewitz: Esperanto und Kultur? Eine Rezension:
Aleksandr Sergeevič Mel'nikov über Linguokulturologische Aspekte
internationaler Plansprachen (Rezension) (Esperanto kaj kulturo? Recenzo pri la
verko de Aleksandr Mel'nikov: Lingvokulturaj aspektoj)

Detlev Blanke: Artur Bormann und die „Gesellschaft für Internationale Sprache
e.V.“. (Artur Bormann kaj la Societo por Internacia Lingvo)

Birte Arendt: Niederdeutschpolitik des Landes Mecklenburg-Vorpommern im
Zeichen der Sprachencharta (La politiko pri la platdiĉa lingvo en Meklenburgio-
Antaŭpomerio laŭ la ĉarto de lingvoj).

Autoren (aŭtoroj)

Inhalt der Beihefte 1-11 (enhavo de la Kromkajeroj/Aktoj 1-11)

5.3 Simpozio pri interkultura komunikado en Gotenburgo

Post la Universala Kongreso de Esperanto 2003 en Gotenburgo/Svedio okazis
kolokvo, kiun aranĝis la Akademio de Esperanto kun subteno de la Sveda
Akademio (kiu disdonas la nobelpremiojn).

La ĉeforganizanto estis prof. Christer Kiselman.

La aktoj aperis:

Kiselman, Christer (2005, Eld.): *Symposium on Communication Across Cultural
Boundaries. Simpozio pri interkultura komunikado. Dobřichovice: KAVA
PECH, 157 p.*

Contents / Enhavo

Christer Kiselman:

Preface / Antaŭparolo

Sture Allén: In the spirit of cultural communication (Spirite de kultura
komunikado)

Jouko Lindstedt: Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo
(Cross-language communication without a lingua franca: the Balkan model)

Renato Corsetti: La arbo daŭrigas verda sian verdecon: lingvaj kaj kulturaj aspektoj de la lernanto-lingvo ĉe lernantoj de esperanto (The tree still greens its greenness: linguistic and cultural aspects of the interlanguage of people learning Esperanto)

Lars-Gunnar Andersson: What makes a language hard? (Kio faras lingvon malfacila?)

Detlev Blanke: Tradukado kaj esperanto: traduksciencaj aspektoj (Translation and Esperanto: on some problems of translation theory)

Probal Dasgupta: Kulturaj limoj kaj la civila socio en multlingva socio: aliro substancisma (Cultural boundaries and civil society in a multilingual society: a substantivist approach)

Probal Dasgupta: La communauté ouverte, les langues en Inde et l'espéranto: une perspective substantiviste. (La malfermita socio, la lingvoj en Barato kaj esperanto: perspektivo substancisma)

Ilona Koutny: Interkultura komunikado en Europo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj (Intercultural communication in Europe: English and Esperanto as alternative communication tools)

Humphrey Tonkin: Esperanto: La kultura dimensio (Esperanto: The cultural dimension)

Franz-Georg Rössler: La muziko - ĉu vere internacia lingvo? (Music - is it really an international language?)

Zlatko Tišljar: Ĉu interkulturaj diferencoj helpas aŭ malhelpas la interkulturan dialogon? (Are intercultural differences helpful for the process of intercultural dialogue?)

Programo / Program

5.4 Esperantologio – Esperanto Studies (EES) kajero 3

La ĉefredaktoro de EES aperigis la trian kajeron:

Esperantologio – Esperanto Studies (EES). Kajero 3, 2005, Issue No. 3, Upsalo: Uppsala: University; Dobřichovice: KAVA PECH, 68 p.

Enhavo / Contents

Christer Kiselman: Salutvorto de la redaktoro.
A word from the Editor.

Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti: Influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto: psikolingvistika esploro.

Renato Corsetti: En Germanujo pli ol aliloke: esperantologia agado.

Marcus Sikosek: Dokumente zum „Weltspracheverein Nürnberg“.

Bernhard Pabst: Lingva Kritiko (1932-1935): La unua esperantologia periodaĵo.

La kajero, same kiel la antaŭaj du, estas ricevebla ĉe UEA. Krome ekzistas reta eldono, kiun redaktas prof. Ingrid Maier: <http://www.math.uu.se/esperanto> .

5.5 Libro de Marc van Oostendorp pri Esperanto

La konata interlingvisto Marc van Oostendorp antaŭ nelonge aperigis jenan nederlandlingvan libron:

Oostendorp, Marc van (2004): Een wereldtaal. De geschiedenis van het Esperanto. Amsterdam: Athenaeum – Polak & van Gennep, 214 S. (Monda lingvo. La historio de Esperanto)

5.6 Interlingvistikaj temoj en tradukscienca antologio

La traduksciencistino (translatsciencistino) *prof. d-ro Heidemarie Salevsky* dum 15 jaroj en Humboldt-Universitato de Berlin kaj poste en la Altlernejo Magdeburg okazigis entute 70 simpoziojn pri traduksciencaj temoj. Tie 100 fakuloj el 15 landoj prezentis 153 prelegojn, inter ili ankaŭ *Wera* kaj *Detlev Blanke* (Berlin), kaj krome *prof. Reiner Arntz* (Hildesheim), kiu trovas gravaj interlingvistikajn temojn.

Ke la eldonantino elektis la kontribuojn de la menciitoj montras ŝian simpatian por interlingvistiko. La profesorino ankaŭ estas membro de la germana Societo pri Interlingvistiko.

Salevsky, Heidemarie (2005, Eld.): Kultur, Interpretation, Translation. Ausgewählte Beiträge aus 15 Jahren Forschungsseminar. Frankfurt/Main k.a.: Peter Lang, 415 p.

Jen la interlingvistikaj kontribuoj:

Arntz, Reiner: Sprachplanung und Plansprachen – auch ein Thema für die Übersetzerausbildung (Lingvo-planado kaj planlingvoj – ankaŭ temo por la eduko de tradukistoj).

Blanke, Wera: Terminologiearbeit und die Plansprache Esperanto – Einige Aspekte und Ergebnisse (Terminologia laboro kaj la planlingvo Esperanto – Kelkaj aspektoj kaj rezultoj).

Blanke, Detlev: Zamenhof als Übersetzer. (Zamenhof kiel tradukisto.).

5.7 KAEST-volumo 4

Dum kelkaj jaroj la entrepreno KAVA-PECH sub gvido de d-ro Petro Chrdle okazigas la serion Konferencoj Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (vidu ĉapitron 6 en ĉi-tiu eldono). Aperis la aktoj pri la 4-a kolokvo:

Pluhař; Zdeněk (2005, Eld.): Fake pri Esperanto kaj esperante pri sciencoj. (Serio: Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko, vol. 4). Dobřichovice: KAVA PECH, 84 p. (kun resumoj en la ĉeĥa, angla kaj germana).

Jen la enhavo:

Jan Werner: Planlingvo.

Detlev Blanke: Kio estas faklingvo kaj kiel esplori ĝin? Kelkaj rimarkoj.

Heinz Hoffmann: Problemoj de “nespeciala speco”.

Wera Blanke: Pri terminoj en Vikipedio – ekzemploj el la teatra fako.

Miroslav Malovec: Vikipedio: Aktualigo de Enciklopedio de Esperanto (1933-34)

Josef Hron: Ebloj por la elektronika prilaborado de grandaj vortaroj de Esperanto.

Marc Bavant: Apliko de XML al fakaj laboroj pri Esperanto

Martin Minich: Esperanto@Interreto

Rüdiger Sachs: Parazitismo kaj parazitologio

Ottó Haszpra: Lingvaj kostoj de Eŭropa Unio

Bojidar Leonov: Evoluo de internacia ekologia turismo en Eŭropo.

6 KAEST: Konferencoj Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

Petr Chrdle

6.1 La ideo

La ideo organizi renkontiĝojn de fakuloj-esperantistoj sub la nomo “Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko” estiĝis antaŭ preskaŭ tri jardekoj en la tiutempa Ĉeĥoslovakio.

Ni konsideru, ke tiam la alireblo de internaciaj kunvenoj estis limigita ne nur pro la vojaĝ-distancoj kaj vojaĝ-elspezoj, sed ankaŭ per la t.n. „fera kurteno“, kiu tiam estis dividanta la mondon en politikajn Okcidenton kaj Orienton. La libereco de la vojaĝado estis precipe el Oriento tre limigita.

Des pli valora estis ĉiu renkontiĝo alirebla ankaŭ por „orientanoj“.

6.2 La unua serio (1978 – 1991)

La *unuan serion* de tiuj fakaj renkontiĝoj organizis alterne Sciencaj-Teĥnikaj Sekcioj de la landaj Esperanto-asocioj, t.e. de la slovakaj kaj la ĉeĥaj.

Oni nomis la aranĝojn aŭ seminario aŭ konferenco kaj, krom la unua, ĉiam estis elektita unu ĉefa faka temo.

La *unua AEST* en la jaro 1978, okazinta en la slovakaj urbo *Žilina*, ne havis specialan ĉeftemon.

La *dua 1980* en la ĉeĥa industria urbo *Ústí nad Labem* studis *problemojn de la vivomedio*.

La *tria 1981*, denove en *Žilina*, detale pridiskutis la *aplikadon de komputiloj*.

1982 okazis la kvara AEST en la ĉeĥa urbo *České Budějovice* kaj atentigis la ĉeestintojn pri *energio kiel tutmonda problemo*.

La *kvina 1984*, en la grava moravia industria urbo *Brno* (Ĉeĥio) traktis la *perspektivojn de la monda nutraĵ-produktado*.

La *sesa* en la unua serio kaj la lasta „slovaka“ AEST okazis 1988 en la slovakaj urbo *Poprad* kaj studis *raciigon en scienco kaj teĥniko*.

La *sepa en 1989* kaj tute lasta en la unua serio estis la seminario okazinta en la sudmoravia urbeto *Strážnice*, tie estis la ĉefa temo *fervoja trafiko*; ĉi tiun AEST oni komprenis kiel preparon de la ĉeĥaj esperantistoj-fakuloj por la 43-a kongreso de IFEF, kiu okazis en majo 1991 en *Olomouc*.

Dum ĉiuj supre listigitaj fakaj renkontiĝoj oni ĉiam diskutis ankaŭ pri la problemoj de la *faka lingvo, terminologio, nomenklaturaj*.

Ĉiam estis eldonita *prelegokolekto*, kutime antaŭ la seminario (konferenco). Tiuj prelegokolektoj ĝis nun sendube estas interesa fonto de fakaj tekstoj, kaj el la vidpunkto terminologia kaj el la vidpunkto pure faka, eĉ se ni konsideras, ke sciencoj de tiuj tempoj pluevoluis.

6.3 La dua serio (1998 -)

Post la unua serio sekvis relative longa paŭzo – novembre en 1989 en Ĉeĥoslovakio okazis politika renverso, cetere tiu trafis tiutempe ĉiujn „orientajn“ eŭropajn ŝtatojn. Kaj la politika „tertremo“ kaŭzis ankaŭ ekonomian ĥaoson – la fakuloj-esperantistoj devis zorgi pri aliaj gravaj aferoj, iam temis eĉ pri la ekzisto de la Esperanto-asocioj mem.

Nur post preskaŭ unu jardeko la ideon de tiuj utilaj fakaj entreprenoj transprenis la Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petro Chrdle – KAVA-PECH. La unua kunveno kiel „kolokvo“, la ceteraj kiel „konferenco“, tial oni ekuzis la

mallongigon KAEST, kiu nun jam estas konata en la Esperanta faka medio.

La *unua* KAEST okazis en Prago, ĉefurbo de Ĉeĥio, en la jaro 1998. La ĉefa temo estis *Modernaj rimedoj de komunikado*, la du ceteraj temoj studis la terminologiajn problemojn de aplikoj de Esperanto kaj diversajn temojn el scienco kaj teĥniko. Oni aŭdis sume 24 prelegojn, 7 pri la ĉefa temo.

La *dua* KAEST okazis denove en Prago en la jaro 2000. La ĉefa temo estis *Ekonomio sojle al la tria jarmilo*. Pri la ĉefa temo parolis sume 7 prelegoj. Eĉ pli multe da prelegoj studis la temon Terminologiaj problemoj de Fakaj Aplikoj de Esperanto – sume 10. La ceteraj 4 prelegoj estis pri diversaj fakaj temoj.

La *tria* KAEST en la jaro 2002 okazis en urbeto proksime de Prago – *Dobřichovice*, nome ĉi tie estas ankaŭ la sidejo de la agentejo KAVA-PECH. Oni difinis kiel ĉeftemon: *Elektronikaj rimedoj*. Pri tiu temo parolis 7 prelegoj. La ceteraj 16 studis terminologiajn problemojn de Esperanto kaj diversfakajn temojn.

La *kvara* en 2004, provizore la lasta en la dua serio, KAEST 2004, trovis la konferencejon denove en *Dobřichovice*. Ĉi tiu KAEST havis nur du temojn, nome *Fake pri Esperanto*, kiu celis la terminologiajn kaj ĝenerale faklingvajn problemojn, kaj *Esperante pri Sciencoj*, kiu studis diversfakajn aferojn. La unua temo enhavis 8 prelegojn, la dua 3.

6.4 Prelegotekstoj kaj fakuloj

Oni menci, ke por KAEST, t.e. en la dua serio de la ĉi-specaj entreprenoj estis elektita alia procedo en la eldonado de la prelegokolektoj – ankaŭ nun al ĉiu KAEST apartenas la presita prelegaro, sed la prelegokolektoj estas eldonataj post la kunveno, por ke la aŭtoroj povu eventuale modifi siajn kontribuojn post la okazinta diskuto.

Menciinde estas ankaŭ, ke nun la kolektoj estas altnivele presitaj, ĉiu kiel libro kun sia ISBN. La Esperantajn tekstojn de la prelegoj akompanas resumoj en la angla, germana kaj ĉeĥa lingvoj.

Dum KAEST kunvenadas kutime 40 ĝis 50 fakuloj. Krome en *Dobřichovice* en la „familia“ medio de la pensiono *Sokol*. Oni povas diri, ke la tradicio AEST – KAEST jam firme enradikiĝis en la medion de eŭropaj fakuloj-esperantistoj.

Dum KAEST prelegas fakuloj kun multjara scienca reputacio, sed la pordo estas malfermita ankaŭ por la junaj fakuloj. Menciinde estas, ke la organiza motoro de ĉi tiuj KAEST estas estro kaj posedanto de la firmao KAVA-PECH PETRO CHRDLÉ. Pri la fakenhavo kaj pri la prelegokolekto de KAEST 1998 zorgis MIROSLAV MALOVEC, por la ceteraj KAEST transprenis tiun taskon ZDENĚK PLUHARĚ.

6.5 Aliĝu al la KAEST' 5 en 2006!

La venonta KAEST okazos kun la ĉefa temo *Lingvo kaj Interreto*. La pli detalajn informojn vi povos trovi sur www.esperanto.cz, www.kava-pech.cz/kaest, aŭ info@kava-pech.cz. Skribe vi povas kontakti la organizantojn ĉe la adreso: KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio.

7 Bibliotekoj kaj arkivoj

7.1 Esperanto-biblioteko en la IULM-Universitato de Milano

Andrea Montagner

En la jaro 2000 la Biblioteko de Universitato IULM (*Istituto universitario lingue Milano*), nun Libera Universitato pri lingvoj kaj komunikadoj IULM (*Libera università di lingue e comunicazione IULM*) ricevis libroposedadon de Itala Interlingvistika Centro por mastrumi ĝin. Ĝi konsistis el pli malpli 1800 libroj kaj 300 revuoj. Ĉar ĝi situas ene de la Ĝenerala Biblioteko pri Lingvoj kaj Komunikado, tie estas la Biblioteko de Universitato IULM, la temoj oportune estis enmetitaj ene de la Ĝenerala Katalogo. Pro tio la deviga elekto pri la klasifo de la libroj kaj revuoj estis la Decimala Klasifo de Dewey.

Tial ĉiuj temoj, de la fakula literaturo ĝis la esperanta literaturo, estis enmetitaj en la katalogon kaj estas videblaj de ĉiuj studentoj kaj serĉantoj.

Ekzemple studento pri turismo povas scii ke Biblioteko pri Esperanto ekzistas ene de la Biblioteko ĉar proksimaj al la neesperantistaj vortaroj pri turismo estas ankaŭ esperantaj vortaroj pri turismo.

Por la momento la libroj estas aranĝitaj laŭ du ĉenoj: ESP. (libroj kaj revuoj je granda formato) kaj EPO. (broŝuretoj). Kiam la Biblioteko estos en nova konstruaĵo, la biblioteko de esperanto certe havos novan aranĝon laŭ la Klasifo Dewey.

Kiam mi komencis katalogi la libraron mi tute ne estis esperantisto kaj eĉ ekkonis Esperanton nur por legi kaj kompreni la temon de la libroj. Tamen mi tuj ekkonsciis ke pro Esperanto mi povis apliki la tutan klasifon Dewey, kiu estas universala kiel nia lingvo.

Jen kelkaj temoj:

- 028 Legado
- 160 Logiko
- 200 Religio
- 340 Juro
- 410 Lingvistiko (kun multaj vortaroj)
- 500 Naturaj sciencoj kaj matematiko
- 610 Medicino
- 780 Muziko
- 800 Literaturo (kaj ĉiuj literaturoj tradukitaj).

Vastan eĥon havis rete tiu ĉi Katalogo: <http://aleph5.iulm.it> tie sube klaku al : *Biblioteca di Esperanto*, poste klaku al *Ricerca Browse*, tie malfermiĝos masko por serĉi tilolojn aŭ aŭtorojn.

La biblioteko estas la unua por Esperanto en Italio, kaj tio permesis plivastigi la posedaĵon de libroj kaj multaj esperantistoj, eĉ universitataj profesoroj, interesiĝis donaci al la Biblioteko IULM siajn librojn kaj revuojn por valorigi kelkajn tresorojn de la esperanta kulturo kaj literaturo, kiuj alimaniere estus perditaj. Aliaj donacoj estas bonvenaj!! Vidu la suban adreson.

Post 5 jaroj de la komenco de mia sperto kiel E-o-bibliotekisto mi konscias ke E-o-bibliotekistoj devus unuiĝi je profesia nivelo por interkonsenti komunan servon, komunan katalogon, por ĉiuj esperantistoj, ĉiuj legantoj kaj ĉiuj serĉantoj, por respondi pozitive al regulo de Ranganathan: unue venas leganto. Pro tio mi pensas ke, en la “Uragano de ideologioj”, E-bibliotekistoj povus doni landon kie eblas interkonsenti pri paco kaj kvieto.

Andrea Montagne

Respondeculo de Biblioteko pri Esperanto, Universitato IULM
andrea.montagner@iulm.it

Materialojn bv. sendi al :
Biblioteko Universitato IULM
je la atento de Sin.ro Andrea Montagner
Via Carlo Bo, 1
IT-20146 MILANO

7.2 Katalogo II de la Fajszki-Kolekto

Kiel konate, unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj, tiu de *Károly Fajszki* nun troviĝas sekure en la Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto.

Pri la biblioteko antaŭ kelkaj jaroj aperis la unua katalogo:

Pataki-Czeller, Mária (1991): Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajszki, Budapest. Libroj. Parto I. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 542 S.

Antaŭ nelonge aperis la dua katalogo:

Zsebeházy, György (2005, Red.): Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajszki, Budapest. Libroj. II-a parto. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 457 S.

(Mi dankas al *d-ro Dudich Endre* pro la afabla havigo de la katalogo – D.B.)

7.3 Kolekto de familio Blanke eniros ŝtatan arkivon

La 11-an de aŭgusto 2005 *Wera kaj Detlev Blanke* en Berlin subskribis kontrakton kun la direktorino de la Fondaĵo Arkivo de Partioj kaj Amasorganizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo (*Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv, SAPMO*), laŭ kiu ilia ampleksa interlingvistika biblioteko kaj arkivo en la estonteco trovos konvenan lokon.

Post la forpaso de la posedantoj, resp. laŭ antaŭe fiksenda dato, la valora scienca kolekto fariĝos oficiala parto de la germana federacia arkivo kaj tiel malferma al la science interesita publiko.

En SAPMO jam troviĝas la persona postlasaĵo de la unua prezidanto de GDREA (Rudi Graetz, prezidanto de 1965-1977), la kompletaj aktoj de la oficejo de GDREA kaj de ties biblioteko kun pli ol 2000 volumoj.

Pri la biblioteko de GDREA jam eblas detale informiĝi en la reto: http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm.

Post iom da tempo ankaŭ eblos orientiĝi en la reto pri la aktoj de GDREA.

8 Finna libro: Pri eŭropa lingvo-politiko

Marjut Johansson & Riitta Pyykkö (2005, red.): Monikielinen Eurooppa - Kielipolitiikka ja käytäntöä (Multlingva Eŭropo - Lingvopolitiko kaj praktiko), Helsinki: Gaudeamus kirja. ISBN 951-662-948-2, 374 p.

(La eldonejo: <http://www.gaudeamuskirja.fi/>)

Enhavo:

Marjut Johansson & Riitta Pyykkö: Johdanto: monikielisyys ja kielipolitiikka (Enkonduko: multlingveco kaj lingvopolitiko)

Marjut Johansson & Matti Wiberg: Institutionaalinen monikielisyys Euroopan unionissa: monesta kohti yhtä? (Institucia multlingveco en Eŭropa Unio: de multaj al unu?)

Jouko Lindstedt: Uusia kieliä vai lisää englantia? Itäisen Keski-Euroopan maat Euroopan unionissa (Novaj lingvoj aŭ pli da angla? La landoj de la orienta Mez-Eŭropo en Eŭropa Unio)

Antero Jyränki: Euroopan unioni ja kielet - oikeudellisia näkökohtia (Eŭropa Unio kaj lingvoj - juraj observoj)

Tom Moring: Eurooppalainen vähemmistökielipolitiikka (Minoritatlingva politiko en Eŭropo)

Marjatta Huhta: Eurooppalainen kielipolitiikka ja kielitaitovarannon kehittyminen (Eŭropa lingvopolitiko kaj la disvolviĝo de la lingvosciaj provizoj)

Andrew Chesterman: Anglanti globalina ja eurooppalaisena lingua francana (La angla kiel tutmonda kaj eŭropa interlingvo)

Keith Battarbee: Monikielisyys ja kielipolitiikka Britteinsaarilla: Britannia ja Irlanti (Multlingveco kaj lingvopolitiko en la Britaj kaj Irlandaj Insuloj: Britio kaj Irlando])

Alberto Carcedo: Espanja kiel et ja espanjan kiel (La hispaniaj lingvoj kaj la hispana)

Marjut Johansson: Ranskan kiel ja ranskalainen kielipolitiikka (La franca lingvo kaj la franca lingvopolitiko)

Ahti Jäntti: Monikielisyys Saksassa (Multlingveco en Germanio)

Helena Lehečková: Tŝekki ja muut Tŝekin kiel et (La ĉeĥa kaj aliaj ĉeĥiaj lingvoj)

Riitta Pyykkö: Venäjä - kiel ja valtio. (La rusaj lingvoj kaj regno)

Eve Mikone: Viron kiel ja kielipolitiikka (La estona lingvo kaj la estona lingvopolitiko)

Leena Huss & Anna-Riitta Lindgren: Monikielinen Skandinavia (Multlingva Skandinavio)

Pirkko Nuolijärvi: Suomen kiel et ja kielelliset oikeudet (La lingvoj kaj lingvorajtoj en Finnlando)

Harri Mantila: Suomi kansalliskielenä (La finna kiel nacia lingvo)
Mirja Saari: Ruotsin kiel Suomessa (La sveda lingvo en Finnlando)

Irja Seurujärvi-Kari: Saamen kiel ja saamelaisten kielelliset oikeudet 2000-luvulla (La samea lingvo kaj la lingvaj rajtoj de la sameoj post la jaro 2000).

Esperanto estas menciata en tri artikoloj (de Lindstedt, Jyränki kaj Chesterman).
Jouko Lindstedt

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanker@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj bonvenas.
